

N°169
janvier
février
mars
2015

LA INFORMILO

N° 169
januaro
februaro
marto
2015

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

ESPERANTO
2015
Justa Komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

esperanto
France-Est

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 15€

Reta abono: 7,50€



Plurilinguisme: les jeunes espérantophones au top!!!

Ils sont de plus en plus nombreux, les DENASKULOJ parmi les espérantophones du monde entier. Dans une langue nationale qui sert actuellement de langue de communication internationale, on les appelle les NATIVE SPEAKERS! Eh oui! L'espéranto est la langue de communication familiale dans de nombreux couples internationaux! Les parents de nationalités différentes se sont souvent connus lors d'un congrès ou de vacances dans un milieu espérantophone. Dans leur famille la langue naturelle de communication est l'espéranto. Leurs enfants apprennent tout naturellement l'espéranto et petit à petit les langues de leurs parents. Parfois même une langue supplémentaire à l'école, selon le pays où ils sont installés. Vérifiez vous-même en consultant le site suivant:

Esperanto: Like a Native – YouTube www.youtube.com/watch?v=UzDS2WyemBI

Mais les enfants de parents monolingues peuvent également profiter des qualités propédeutiques de l'espéranto! Notre membre strasbourgeois Cyrille HURSTEL promeut, on ne peut plus efficacement, le bilinguisme à travers l'espéranto. Et il ne se contente pas d'en parler, il a expérimenté sa méthode avec ses trois filles, et ses résultats sont remarquables. Jugez-en vous-même!

<http://blog-bilinguisme.fr/produits/avantage-extraordinaire/>

IF

INTERNACIA FESTIVALO

... jarfine al IF

La 31-a INTERNACIA FESTIVALO en JÜLICH

27. 12. 2014 - 3. 1. 2015

Kadra temo: Novaj energioj



Mikaelo Bronštejn gvidas la interkonan vesperon kun helpo de Vera Vlasova

ĉiuj. En la manĝejo ni mem priservis nin kaj la manĝo estis bongusta.

Jana Kamenicka el Slovakio



Al la kadra temo kontribuis ĉefe Alfred Schubert per prelegoj pri "Energi-sanĝiĝo en Germanio" kaj "Vetveturado per elektraj aŭtomobiloj". Krom tio okazis jam la 8-an fojon IVU-prelegoj (Internacia Vintra Universitato) agnoskitaj kiel AIS sesioj. Okazis ekzamenoj kaj en la Adiaŭa vespero oni disdonis atestilojn al la sukcesintoj. Kadre de IVU Amri Wandel prelegis pri "La scienca revolucio de Einstein - 2015 centjara jubileo de la Teorio de Relativeco" kaj pri "Vivo sur foraj planedoj - la revolucio de la spacteleskopo Kepler". En iu sennuba vespero ni havis okazon spekti la ĉielon kaj Lunon per malgranda teleskopo kun klarigoj de Amri. Dieter Kleemann prelegis pri "Romkatolika misia agado en Japanio kaj la sekvoj por la socia strukturo kaj politiko en la lando".



Vizito al la urbo Jülich, gvidas Ebel Waldemar

La ĉi-jara Internacia Festivalo estis vere la lasta. Enskribiĝis 106 personoj el 18 landoj.

Tamen kelkaj ne povis ĉeesti pro diversaj kialoj. Sed aperis novuloj, kiuj bedaŭris ne malkovri la IF-on pli frue. Dum la tuta semajno regis familia etoso, en kiu ĉiuj ĝoje amuziĝis post la vespera programo en la "Knajpo". La program-oferto, kiel ĉiam estis bunta, aperis kelkaj kromaj programeroj. Ĉiu povis elekti laŭ sia

plaĉo. Kun bedaŭro ni konstatis forpason de Rémy Bouchet, al kiu ni omaĝis per kelkaj vortoj kaj rememoroj en la Interkona vespero.

La vetero favoris nin kaj instigis al pluraj promenadoj en la urbo kaj en la apuda parko.

La novkonstruita IF-ejo laŭ hoteleca stilo estas tre komforta kaj ĝi plaĉis al



Bonvenigo al novaj partoprenantoj



Latva Vespero

krome li instruis nin kiel bone foti. André Weber malkovris kaj diskutis pri siaj spertoj rilataj al malgrandaj gajnoj: "Sukcesetoj per akcioj kaj fondusoj". Li ankaŭ gvidis posttagmezan ekskurseton al elfosejoj en la regiono de Hambach kaj al biogasproduktejo. Dieter Rooke animis lecionon pri didaktiko. Pri ĝemelaj urboj interesiĝas kaj klarigojn pri ili donis Pieter Engwirda.

Prelego de Ian Fantom titoligis: "La Kaiser, Titanic kaj la Unua Mondmilito". Karl Breuninger parolis pri sia eksterrordinara rilato kun Rusio kaj Sovetio dokumentita per multaj bildoj.

Matene oni povis ekzerci "Tai-ĉi-ĉuan" kun Barbara Poterucha kaj poste malstreĉiĝi per dancgimnastiko kun Vera Vlasova. Kelkaj partoprenantoj ankaŭ plurfoje profitis saŭnadon. Dum la kafopaŭzoj ĉiuj vikle



Nataša Bertse kaptas la atenton de la publiko

Oni spektis kelkajn bildprezentojn pri diversaj vojaĝoj fare de niaj partoprenantoj.

Barbara Muhlemann prezentis kaj parolis pri sia vojaĝo en Argentino okaze de la 99-a UK, Amri Wandel vizitis kaj rakontis pri siaj vojaĝspertoj en Hindio, Liba kaj Floreal montris filmon pri Nepalo de Roman Dobrzyński. En marto ili partoprenis la Specialan Renkontiĝon organizitan de nepalanoj kaj poste ili kune



Mikaelo Bronštejn parolis pri "La monda E-literaturo: enspezo de Rusio". Krome li prelegis pri "Rusio kaj Ukrainio, la du ŝtatoj - ĉu fratjaj?", klarigante ĉefe la historion de Ukrainio.

Same kiel en aliaj IF-oj ni povis ekscii pri la rusa eldonejo Impeto kaj Anna Striganova rakontis pri fabelaj mondoj kaj montris siajn pupkreaĵojn. En aliaj prelegoj ni eksciis pri "Vegana vivo el propra sperto" de Klaus Friese. Harald Schicke parolis pri "Alia alir-maniero al malsanoj". Aŭtoran horon pri siaj libroj havis Nora Caragea. La profesia ĵurnalisto Alfred Schubert informis pri la funkciado de gazetara sistemo. Lia prelego titoligis "Efike kunlabori kun ĵurnalistoj" kaj



Fabelaj pupoj de Anna Striganova

babilis aŭ rigardis fotoalbumojn de Liba Gabalda pri ĉiuj IF-oj, kiujn ŝi kun Floreal ĉeestis. Ili ankaŭ projekciis filmon pri rememoroj el diversaj IF-oj. Entute ili partoprenis 23-foje. Tiom plaĉaj la festivaloj estis. Ankaŭ Brian Moon prezentis lastjaran IF-on en retrospektivo. Liba organizis la dancvesperon laŭ la latinamerika muziko, ne mankis ŝiaj hejmfaritaj kuketoj. Bone funkciis la libro-servo prizorgita de Paul Peeraets kaj Jean Luc Thibias.





Ĉe la fino de la polonezo, la paroj salutas la spektantojn, kiuj reciprokas per aplaŭdoj

vizitis la orientan parton de la lando.

La ĉi-jara tuttaga ekskurso gvidis nin al Kolonjo, kie ni unue promenis en la urbo sub ĉiĉeronado de Winfried Schumacher, kiu tie loĝas. En restoracio, kie ni tagmanĝis ni renkontis Bruno-n Knapstein kun lia edzino. Li estis longjara partoprenanto kaj kunhelpanto de IF-oj.

Pro sia aĝo li ne povis partopreni dum la lastaj du jaroj.

En vesperaj programeroj sonis la E-kantoj de latvaj kaj rusaj partoprenantoj, koncertis Nataša Bertse el Svedio. En la Internacia vespero niaj talentuloj prezentis kantojn, dancojn, amuzajn skeĉojn, akordionan kaj gitar-ludadon. Specialan muzikon sen vera instrumento prezentis Waldemar Ebel per plasta strio inter siaj lipoj. Silvestraj bufedo kaj balo, kiu komenciĝis per polonezo, estis plurfoje interrompita pro festado de diversaj Novjaroj. Tio ebligis multfojan tostadon, brakumadon kaj interkisdadon de la ĉeestantoj.

La lasta vespero - Adiaŭa IF estis triste festena. Hans-Dieter Platz (HDP), la ĉef-organizanto de la aranĝo ofertis glason da ŝaŭmvino kaj donacis al ĉiuj DVD-diskon kun fotoj de ĉiuj IF-oj. Li kore dankis al ĉiuj kunhelpantoj kaj prelegantoj. Ankaŭ ni dankis lin pro IF-oj, kiujn li tiel bone kaj profesie organizis. Bona etoso regis ĝis malfruo en la apuda enirhalo. Tiel finiĝis la longjara internacia festivala tradicio kun nostalgio daŭrigi...

Liba Gabalda



Rusa novjariĝo kun bonvenigaj kantoj

Fotemuloj por la polonezo



Fotoj de Andreo



‘Nova Urbo’

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

En Mezeŭropo estas lanĉita nova projekto „*Pontoj de Eŭropo – pasinteco kaj futuro*” kiu realigas celojn de t.n. Viŝegrada Grupo (Slovakio, Pollando, Ĉeĥa Respubliko kaj Hungario).

Pontoj de Eŭropo

Unue ĉiu el la kvar landoj okazigos internaciajn renkotiĝojn kun prezentado de dokumantaj filmoj, por aŭskulti atestojn de pli maljunaj homoj, kiuj parolos pri sia vivo en la 20a jarcento. Tio celas konsciigi loĝantojn (precipe la junajn) en tiuj landoj ke ĉiu estas respondeca pri futuro de sia nacio, kaj ke ankaŭ simplaj homoj povas kuraĝe influ la historion. Viŝegrada Grupo, ankaŭ nomata *Viŝegrada Kvaropo* aŭ simbole: „V4” – estas alianco de kvar mezeŭropaj ŝtatoj (CS, SK, PL, HU). Ĝia celo estas integriĝo ekonomia kaj kultura, komuna politiko pri energio, milit-defendo ktp.



La grupo fondiĝis en februaro 1991, en hungara kastelurbeto Viŝegrado, situata sur la pitoreskaj bordoj de Danub-rivero. De tie oni la prenis la nomon “V4”.

La dua projekt-etapo koncentriĝos je la estonteco de tiu regiono kaj je farendaj taskoj por antaŭenigi reciprokan kunlaboron interne de la “kvaropo” kaj daŭrigi amikajn rilatojn ankaŭ kun la najbaraj landoj. La organizotaj renkontiĝoj, simpozioj kaj aliaj aranĝoj celas al konstruado de pontoj inter pasinteco kaj estonto, por ke la novaj generacioj lernu formi pli justan kaj pacan mondon.



Por realigi tiajn projektojn, ekde 1999 funkcias Internacia Viŝegrada Fonduso. Por ĝi, la membroŝtatoj de “V4” malfermis ĉefoficejon en slovakia ĉefurbo Bratislava. La fonduso subvencias sciencan, artistan kaj alispecajn agadojn; ĝi disponigas ankaŭ stipendiojn al postdiplomaj studoj kaj por junulara kunlaboro. Ĝi premias tiujn neregistarajn organizaĵojn, kiuj firmigas integriĝon de tiu mezeŭropa ĉefregiono.

Kelkfoje oni ankaŭ apogas similajn iniciatojn en Balkanio (Sudorienta Eŭropo) por plibonigi kunlaboron de la t.n. ABC-landoj (inter la Adria, Balta kaj Ĉerna (=Nigra Maroj). Historie oni uzis por ĝi latinan terminon ‘*Intermarum*’ – Intermaro.

La plej uzata ligvo en tiu projekto – kiel kutime en internacia politiko – estas la angla, kun sia bedaŭrinda malfacileco. Tamen je malpli alta nivelo, dum renkotiĝoj inter simplaj civitanoj, la esperantistoj havas ŝancon praktike uzadi la Internacian Lingvon, same kiel dum la antaŭaj jardekoj.

Nova Urbo estas internacia magazeno eldonata de Fokolara Movado, eldonata en kelkdeko da lingvoj. Ĝi antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj kaj komunumoj, kaj krome – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj.



Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich, ricevis la UNESKO-premion por Paca Edukado en 1996a jaro.

Fine de la pasinta jaro, estis celebrata jubileo okaze de la 50-jara ekzistado de Fokolar-movado en Paragvajo. La feston partoprenis diversaj personoj, same posteuloj de la unuaj kolnianoj el Hispanio kiel originalaj loĝantoj de tiu lando – indianoj de Gvaranio, kies lingvo estas tie ŝtate agnoskita.

Paragvaja Jubileo:

Festo de Unueco

/ Fiesta de la Unidad



Dum la ĝoja celebrado de la duoncenta jubileo, oni multe rememoris pri la komencaj jaroj, interparolis, sportumis, dancis, koncertis kaj kantis unisone. Unuaj fokolaranoj, kiuj alvenis al Paragvajo antaŭ 50 jaroj, estis fascinitaj ekvidi tute nekonatan kulturon. Tiel komenciĝis por ili la mirinda aventuro. Vivantaj tie dum jardekoj, ili disvastigis amikecajn mesaĝojn kaj agadis en lokaj komunumoj, kun speciala atento al homoj suferantaj kaj malriĉaj. La jubilea konferenco ĉeftemis pri “*Arto de dialogo interkultura*”. Interesiĝis pri tio ne nur kamparanoj, sed ankaŭ terposedantoj kaj senhejmaj vilaĝanoj, entreprenistoj kaj reprezentantoj de diversaj partioj kaj socigrupoj.

La Gvarania tradicio estis ĉiam forta en Paragvajo, ankaŭ nuntempe. Gvaranioj formis la plej grandan tribon inter dudeko de la aliaj, kiuj loĝis tie pli ol 5 mil jarojn. Iliaj komunumoj vivis harmonie kun la naturo, aprezis la valorojn de familio, ŝercis sanktecon en la vivo kaj respektis dignon de la homa persono. Profesoro pri historio, Diana Durán memorigis ke eĉ dum la unua periodo de subpremo, la indianoj de Paragvajo konservis tradiciajn valorojn de siaj prapatroj. Tial eĉ hodiaŭ ili kapablas krei kontraŭvenon kiam la societon minacas demoralizado. Prof. Durán invitis ke la partoprenantoj de tiu jubileo interesiĝu pli profunde pri la kulturo kaj tradicioj de Gvaranioj.




Por partopreni la jubileon, alvenis granda nombro de junularo kaj ankaŭ familioj kun siaj infanoj. Muziko alportis entuziasmon kaj dancemon. La tre aktiva junularo prezentis bone sintenon kontraŭan al la novmoda slogano “*mi havu ĉion kaj tuj*”. Al siaj samaĝuloj ili parolis pri la sperto vivi ĝoje per helpado al siaj najbaroj kaj homoj malriĉaj. Infanoj 6-10 jaraj (t.n. “Gen4”) lumigis la aranĝon per sia senkondiĉa fido kaj simpleco.



Ankaŭ ĉiuj estis tre interesitaj aŭskulti rakontadon de 80-jaraj homoj, vivantaj tie dum sia tuta vivo. Defioj ankoraŭ restas, sed kiam homoj povas krei unuecon – nenio ŝajnas esti malebla.

Città Nuova /New City estas eldonata de Internacia Fokolar-Centro en Italio kaj en multaj aliaj lingvoj /landoj: ARGENTINO – *Ciudad Nueva*; AŬSTRALIO – *New City*; BELGIO - *Nieuwe Stad*; BRAZILIO - *Cidade Nova*; BRITUJO - *New City*; BULGARIO - *Nov Svjat*; ĈILIO – *Ciudad Neava*; ĈINIO (Hongkongo) - *San Sin Seung*; DANLANDO - *Ny Stad*; **ESPERANTUJO** - *Nova Urbo*; FILIPINOJ - *New City*; FRANCUJO - *Nouvelle Cite*; GERMANIO - *Neue Stadt*; HISPANIO - *Ciudad Nueva /Ciutat Nova* (en kataluna lingvo); HUNGARIO - *Uj Varos*; JAPANIO - *Uno*; KANADO - *Nouvelle Cite*; KENIO - *New City /Nouvelle Cite*; KOLUMBIO - *Ciudad Nueva*; KOREUJO - *Kumul*; KROATIO - *Novi Svijet*; LIBANUJO – *Citte Nouvelle*; NEDERLANDO - *Nieuwe Stad*; OCEANIO - *New City*; POLLANDO - *Nowe Miasto*; PORTUGALIO - *Cidade Nova*; RUMANIO - *Oras Nov*; SLOVAKIO - *Nove Mesto*; SLOVENIO - *Novi Svet*; SVEDIO - *Enald Varld*; SVISLANDO - *Citta Nuova*; URUGVAJO - *Ciudad Nueva*; USONO – *Living City*; VENEZUELO - *Ciudad Nueva*.

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Provizore por ĉi-tiu numero Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines
avant la fin de chaque trimestre		
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.29.85.05.09 03.02.13.01.32	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.ef@wanadoo.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	fredporretti@gmail.com
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur2@yahoo.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net

Abono al La Informilo →	15 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1.	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Esperanto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par <i>l'imprimerie Sprenger</i></p>
----	--

Karaj gesamideanoj,



Ne aperis numero de LA INFORMILO ekde la teruraj eventoj, kiuj skuis la tutan Francion kaj Danion. Certe vi estis informitaj gazete, radie, televide kaj rete. Ne nur en Francio kaj Danio, sed ankaŭ sur la afrika kontinento kaj eĉ en la oriento de nia propra kontinento murdantoj teruras la homojn. Mi imagas nian karan Zamenhof ploranta, konstatanta, ke lia militkuraca rimedo ESPERANTO ne efikas kontraŭ rasismo, interetna mortigado kaj prorelogia murdado. Tamen ni daŭre batalu pace por interparoligi la homojn. Nia interna ideo pluvivigis Esperanton dum pli ol 100 jaroj kaj ni ne dubu pri la valoro de nia kuracilo kontraŭmilita, eĉ se plumuĝas militoj sur diversaj kontinentoj.

Nepre ne kedu, ke nia sinteno estas sinteno de revuloj kaj de naivuloj!!! Vi ja konstatis, ke fanatikaj paroloj sukcesas radikaligi iun junularon, transformi ĉi knabojn en murdistojn. Ĉu vi ne konsentas kun mi, kiam mi asertas, ke adaptita kontraŭpropagando perargumenta povintus evitigi al ili la uzon de armiloj por afiŝi iliajn konvinkojn? Mi memoras, ke antaŭ trideko da jaroj la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj estis afiŝita en ĉiu lernejo, kolegio kaj liceo. Sed ĝi ne nur dekoraciis la murojn. . !

E. L.

Reveno al Krynki (Sokrat Janowicz) Krynki – Bialistok-Ŝwidnik 2014

El la belorusa tradukis Tomasz Chmielik.

Se vi loĝas en vilaĝo, en la kamparo, iom for de granda urbo, vi certe ĝuos tiun rakontaron. Ne ĝin legu unutrajte, ĝuu ĉiun tekston, ĉiun ofte melankolian priskribon de kampara vivo en pasinto, en la ĉirkaŭaĵo de Bialistoko. La originzlo estas skribita en la belorusa lingvo parolata tie. Se vi, leganto estas juna kaj frandas la vivon en moderna urbego, nepre ankaŭ legu ĝin kaj malkovru, kio estos por vi pasinto eble por ĉiam malaperonta. Sed ne rapidu! Legu kaj cerbumu! Tiam vi eniros tiun etoson.

La mondo estas pejzaĝo kun brilaj koloroj Eqrem Basha Swidnik 2014

Traduko al Esperanto Tomasz Chmielik kaj Barhyl Selimi

Ĉi-foje Tomasz Chmielik kaj Barhyl Selimi prezentas al ni nuntempan albanlingvan poeton en Kosovo. Allogas la belkolora kovrilpaĝo de Rozafa Basha. Mi ne longe babilos, sed tutsimple elprenas la poemon, kiu plej plaĉis al mi kaj samtempe donas la tonon de ĉi poezio el turmentita lando:

Korbatado
(Rahje zemre)

se vi frapas sur la pordo kaj neni
malfermas
ne ĉagreniĝu
tio ne signifas, ke la domo estas
malplena

estas nur lacego
malŝato por tuŝi anson

se vi vokas de la korto
kaj neni aperas ĉe la fenestro
ankaŭ ne ĉagreniĝu

la mondo estas surda
ne aŭdas kornatadon
Eqrem Basha

El ombro – antologio de prozo el Rusio Moskvo Rusia Esperantista Unio Eldonejo "Impeto " 2008

Kelkajn inter la sekvaj nomoj vi certe jam konas, sed ankaŭ meritas ielan famon ĉiuj aliaj: Viktor AROLOVIĈ, Grigorij AROSEV, Dmitrij CIBULEVSKIJ, Gafur GAZIZI, Alekso GULJAEV, Klara ILUTOVIĈ, Zoja KAĈALOWA, Jutij KARCEV, Valentin MELNIKOV, Irina MIRONOVA, Ivan NAŬMOV, Aleksander PARFENTJEV, Vladimir PEREPELICA.

Dum ne tre optimismas la nuntempa esperantistaro pro malkresko de la asociaj membroj, venas lumradio el Ruslando kun listo de 14 verkistoj. Sciante ke necesas esperantobredejo ampleksa por naski kelkajn aŭtorojn, kiuj verkomature kapablos skribi. Ĉi bona novaĵo nin atingis per ĉi libreto. Aldonendas, ke ili verkas pri sia vivo en sia lando, kio ja certe interesos esperantlingvaj legantojn, kiuj scivolemas pri aliaj kulturoj. Legu kaj ĝuu!

Bildoj pri Norda lando kaj aliaj rakontoj Sen Rodin (Filippo Franceschi)

La aŭtoro, kiu estas itala, liveras al ni kolekton da bildoj pri sia restado en Norda Lando. Li ne havas alian celon ol realisme rakonti epizodojn de sia vivo tie, sed la ĉiutaga vivo en la Norda Lando neniam estas banala, ofte la realo donas surprizojn kaj superas ĉion, kion oni povas imagi. La dua parto de la libro ne plu situas en la Nordo, sed la epizodoj estas same interesaj kaj ne-ordinaraj, verve rakontitaj.

Oni povas legi la ĉapitrojn unuope, eĉ salti al alia ĉapitro sen perdi intereson. Ili estas kvazaŭ pentraĵoj en ekspozicio, ĉiu havas sian propran intereson.

Mi persone ŝategis tiun libron, kiu estas skribita en facile komprenebla Esperanto
Ginette MARTIN

Redono de mono fare de Eurolines.

Mi somere multe plendis pri la vojaĝ-entrepreno Eurolines. Sed mi havis la agrablan surprizon, en oktobro, ricevi ĉekon, kiu kompensas miajn vojaĝ-kostojn per trajnoj, kiam la buso en Nitra foriris sen mi....

Ginette

Images d'un pays nordique

Le restaurant populaire se trouve dans une petite rue couverte d'étroits passages en bois pour les piétons en raison des réparations de pavés. Sa façade ne se distingue pas des autres: un mélange de styles baroque-empire-liberty, une couleur d'un vert douteux, et une série de petits drapeaux multicolores-un macaron indiquant les hôtels et les auberges.

Une jeunesse de différentes nationalités se presse sur les escaliers. Des sacs à dos élimés sont alignés le long des murs. Les habitués portent des vêtements usagés et ils sentent légèrement mauvais. Ils arrivent ici, après avoir vainement cherché un travail pour l'été dans les capitales proches.

Ils parlent des filles, des possibilités de travail, des salaires journaliers, des permis de séjour, ils sont déjà très informés de tout, presque comme s'ils habitaient ici depuis des années.

Ils organisent leur après-midi: où chercher du travail? où trouver un logement pour la nuit?

Lorsque l'argent sera épuisé et que le papa refusera d'envoyer un nouveau chèque, ils se tourneront vers leurs consulats respectifs qui les réexpédieront à la maison après un sermon de circonstance.

On rencontre aussi des blancs-becs. Leurs yeux sont marqués par l'étonnement de la désillusion, qui les a saisis à leur arrivée lorsque la ville grise de la réalité s'est montrée si différente de la ville-mirage des descriptions.

On repère facilement les novices du vagabondage estival. Ils écoutent bouche bée avec une attitude obéissante les instructions de ceux qui sont expérimentés. La nuit, ne pouvant se payer un lit dans une auberge, ils dorment tous ensemble, maîtres et disciples, sur les bancs de la gare.

A leurs pieds se trouvent des sacs à dos pansus posés sur le plancher.

Au comptoir central, une serveuse blonde dirige le service avec compétence. De la main droite une louche, de la main gauche une fourchette; elle remplit, avec des gestes automatiques, les assiettes qu'on lui présente. Sur la table, trône un réchaud électrique chargé d'énormes marmites. Lorsqu'elles sont presque vides, la serveuse blonde siffle; aussitôt arrive de la cuisine une collègue qui en apporte d'autres pour les remplacer.

Des jeunes gens affamés attendent avec leurs assiettes levées et des regards que les jeunes ont rendus larmoyants.

De grosses assiettes pleines de salade de riz, des soupières de tomates, des plateaux de poires cuites, des empilements de crêpes grises, des pommes de terre au beurre, de la viande de bœuf aux petits oignons dans une sauce aigre-douce circulent dans toutes les directions, portées par les vagabonds les plus bizarres de la faune européenne.

Ils marchent prudemment et en zigzag parmi la foule pour ne pas renverser les récipients, en couvant de leurs regards affamés la nourriture en équilibre instable.

Après avoir rempli les assiettes, on cherche une place assise: deuxième étape, plus difficile. A droite et à gauche se trouve une suite de petites salles à man-

ger presque pleines à craquer. Dans la première, un jeune homme du Sud et une jeune fille du Nord sont assis à côté de la fenêtre. A une petite table proche se trouve un corpulent égyptien au visage rouge et sanguin.

Le jeune homme du Sud serre silencieusement la main de la jeune fille; à présent, il désire fumer, mais, ne trouvant pas de briquet, il demande une allumette à l'égyptien.

Le gars, qui est gros comme une barrique, lève la tête avec peine, enfle sa main dans la poche de son pantalon, et de mauvais gré présente une petite boîte. Mais, en faisant cette contorsion, il aperçoit la jeune fille.

Alors il se tourne complètement en pivotant avec peine sur son siège et commence à parler aux jeunes gens dans un mauvais jargon franco-anglais; ensuite, il s'adresse seulement à la jeune fille, qui répond distraitemment.

Il se lève, s'effondre sur son siège face à la jeune fille du Nord, il se présente et lui parle d'une façon à peine compréhensible avec une insistance remplie d'espoir et de ferveur. Mais à présent le jeune homme du Sud commence à parler à son tour pour trouver une échappatoire.

"Kerstin, nous devrions partir. . .".

Elle se lève immédiatement sans éprouver de gêne, salue aimablement le gros dodu, qui au début ne comprend pas et propose ensuite aussitôt sa voiture pour les conduire n'importe où, où ils le désirent.

Elle refuse aimablement.

Alors, le gros dodu fait une dernière tentative: il lui demande son adresse.

La jeune fille rit: elle habite un peu loin, à mille kilomètres au nord, près du cercle polaire, et elle part dans quelques jours.

Les jeunes gens sortent, le gros dodu reste, en faisant une grimace idiote.

On paie seulement à la sortie: deux couronnes par personne, après avoir mangé à volonté.

Quelques-uns des travailleurs saisonniers les plus dépourvus de perspectives arrivent à dix heures du matin, lorsque le restaurant vient de s'ouvrir. Ils apportent une liasse de journaux et restent, en mangeant et en lisant tranquillement, jusqu'à six heures de l'après-midi, avalant ainsi trois repas pour deux couronnes.

Sur l'escalier passent aussi des individus d'une autre espèce: des citoyens se rendant au bureau communal à l'étage au-dessus. Des citadins maigres, de haute taille, un peu rigides dans leurs mouvements, avec une chevelure d'un blond subtil, des yeux clairs et timides, et de petits nœuds papillons. Tous ont le même aspect, ils sont discrets et un peu gênés.

Ils parlent à voix basse, aimablement, avec l'intonation typique de leur langue, qui ressemble à une mélodie. Il s'agit d'autochtones.

Dans les rues, on se promène péniblement dans l'atmosphère huilée touristique estivale propre à toutes les capitales.

Ambiance qui sent l'éphémère, la sueur, l'artificialité.

(traduit par Catherine ROUX, avec l'aide de Ginette MARTIN)

VANNES : Espéranto : succès pour la pièce de théâtre.

La pièce de théâtre, intitulée Kulpulo en nia Festejo (en espéranto), était commentée en français. Le coupable était dans la salle : telle était la conclusion de l'enquête menée avec vivacité, dimanche après-midi, au centre Henri-Matisse de Ménimur. Il s'agissait également du titre d'une pièce de théâtre écrite par Yvon Taburet, à laquelle près d'une centaine de personnes ont assisté. Sur scène, treize espérantistes ont joué en VO (en langue espéranto), pendant que deux autres entrecoupaient les scènes de commentaires en français. Ces interventions en français constituent une nouveauté pour le spectacle annuel de l'association Espéranto Vannes. Le bilan a été très satisfaisant pour Elisabeth Le Dru, présidente de l'association, qui a estimé que près de la moitié des spectateurs présents ne maîtrisait pas cette langue élaborée par le docteur Zamenof. Une autre pièce en projet Outre les cours, chaque année, Espéranto Vannes propose un spectacle tout public, mais c'est la première fois qu'une traduction en français est faite en direct. D'autre part, il s'agissait d'une pièce interactive : les spectateurs étaient sollicités par moments. Fort de ce succès, l'association va poursuivre ses projets. À savoir, une autre pièce de théâtre et l'inauguration de l'allée Zamenhof en juin, à Beaupré-Lalande. Une espérantiste uruguayenne y sera invitée et assurera aussi une conférence. Autre date à noter : le congrès international qui aura lieu, cette année, en France (Lille), fin juillet. Pratique Contact : tél. 06.21.07.11.09 Site internet : www.esperantovannes.fr Imprimer Télécharger Envoyer

Guy de Maupassant

Georges Duroy enpoŝigis la monreston de sia centgroŝa monero, kaj salutinte la kasistinon, eliris el la restoracio.

Ĉar li nature belaspektis, ĉar lia antaŭa profesio estis suboficira, li rektigis la talion, frizis la lipharojn per gesto militista kaj kutima, kaj ĉirkaŭjetis al la lastaj manĝantoj rigardon rapidan, iun el tiuj rigardoj de beleta fraŭlo, kiuj similas al ĵetadoj de kaptaj retoj. La virinoj levis la kapon al li, tri junaj laboristinoj, unu muzik-instruistino mezaĝa malbone vestita per polva ĉapelo kaj difektita robo, kaj du burĝinoj kun siaj edzoj, kutimaj en tiu modesta restoracio kun antaŭfiksitaj prezoj.
Tradukis : Ahado Michel



HUMURAJĴOJ

En Belgujo, estas la 23a horo. Paro komencas amori en veturilo.
Poliscisto pasas apude kaj vidas la veturilon, kiu svingas.

- Bonan vesperon, kion vi faras en tiu veturilo?
- l'amoro !
- Sed estas malpermesite fari tion sur publiko strato; vi devos pagi al mi monpunon de 100 eŭroj.
- Sed, objetas la virino, estas skandalo ! oni ne plu povas fari kion oni volas?
- Ah, vi estas du, do la puno estos 200 eŭroj.

Anonco : Interŝanĝus virinon, kiu elspezas sen kalkuli kontraŭ virinon, kiu kalkulas sen elspezi.

- _____
- Vilaĝo policisto grumblas kontraŭ junulino, kiu preta plonĝi en lageton.
- Hop, fraŭlino, ĉu vi ne legis la panelon? Estas malpermesite bani sin ĉi-tie!
 - Sed kial vi diras tion al mi nur nun?
 - Ne estas malpermesite nudigi sin.
- _____

Viro al vendistino:

- Ĉu vi havas kandelojn? Estas por ornamo la kunkon por la naskiĝ-dato de mia edzino.
- Kiom da?
- Tridek, kiel kutime.

Kio estas la diferenco inter Parizo kaj virga ino?
respondo : Parizo ĉiam estos Parizo.

Kio estas la diferenco inter virino kaj hundo ?
respondo : La prezo de la kol-ĉeno.

Maljuna fraŭlo 80-jara vizitas kuraciston por sanekzameno antaŭ edziĝo.

- Kiel! vi estas freneza, ĉu mi malbone komprenis? Vi reale diris al mi, ke vi deziras edziĝi ? en via aĝo ? !

- Hej, ne, mi ne deziras, sinjoro kuracisto, mi estas devigata .

ESPERANTO-SUMOO



Sumoo

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Dum la luktokonkurso luktistoj estas grupigitaj en 5 grupoj.

Plej fortaj luktistoj luktas en grupo nomata Jokozuna. Poste sekvas grupoj laŭ fortoj de luktistoj nomataj: Oozeki, Sekiŭake, Komusubi, Maegasira.

Ni invitas al la Marta Esperanto-Sumoo 2015.

Sumooj en la jaro 2015

marta sumoo: de la 15a ĝis la 29a de marto

maja sumoo: de la 10a ĝis la 24a de majo

julia sumoo: de la 5a ĝis la 19a de julio

septembra sumoo: de la 13a ĝis la 27a de septembro

novembra sumoo: de la 8a ĝis la 22a de novembro

Vladimir Opletajev (Vlostano) el Rusio menciis projekton "Esperanto-sumoo" kaj indikis ligilon al la paĝaro de E-sumoo en lia informa teksto pri la Jaro de literaturo en Rusio por la paĝaro "Ural-Siberia esperantista movado" <http://ural-sib.org/eo>.



Hori Jasuo kaj Monto Urso sendis kristnaskajn donacojn al la gelernantoj de La Chaux-de-Fonds, Svislando, dankante pro la partopreno en sumoo kaj laŭdante iliajn bonajn rezultojn. Hori Jasuo skribis iliajn nomojn en la japanaj literoj kaj Monto Urso faris belajn paperajn rozojn.

Vidu la foton senditan de Monika, la instruistino, kiu gvidas ilin.

ILEI subtenas nia sumoo-on morale, sed forte sur la paĝo <http://ilei.info/>. Jen mesaĝo de Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI:

ILEI subtenas "Esperanto-Sumoo"-n. Tiu agado estas faro de HORI Jasuo el Japanio. Ĝi celas stimuli la legadon de Eo-libroj. La partoprenantoj aliĝas, decidas pri tio, kion ili legos kaj kiom da paĝoj tage ili legos. Ili mem konstatas, ĉu ili plenumis tion, jes aŭ ne. Se jes, ili ricevas atestilon. Tiu agado kongruas kun la celoj de ILEI, pro tio la estraro de ILEI decidis morale subteni tiun agadon. Tiu apogo konsistas el kvar aspektoj: artikolo pria en IPR, mencio pria en nia retejo, vastskala anonco al nia membraro la 9an de novembro, aldono de mencio de ILEI sur la atestiloj "Kun morala subteno de ILEI kaj elkoraj gratuloj de ĝia estraro".



Saluto de la plej junaj svisaj legantoj

Legu librojn kaj ŝanĝu la mondon!


Paralele kun la sumoo-konkursoj, ni legu Esperanto-librojn dormantajn en via breto. Vi decidu, kiun libron kaj kiom da paĝoj vi legu ĉiun tagon dum la konkurso. Se vi sukcesos legi tiun kvanton, vi venkos, se ne, tio signifas vian malfortaĵon. Tiamaniere vi povos vere scii la ĝojon de Esperanto-legado, sekve vi progresos multe en Esperanto, kaj se multaj partoprenos en sumoo, tio ŝanĝos la movadon, kaj sekve la mondon.

Ni partoprenu kaj luktu ĝoje!!!

Okaze de tiuj konkursoj, mi proponas al vi partoprenon en lukto, kie homoj ne luktas kontraŭ aliaj homoj, sed kie homo luktas kontraŭ siaj malfortaĵoj en Esperanto-Sumoo.



La unua fojo Vjetnama Esperanto-Asocio presis kaj aldonis diplomojn al "luktistoj" de la internacia legkonkurso - Sumoo. La venkintoj estis honorigitaj dum la Zamenhof-Tago en Hanojo. En la organo Verda Mesaĝo aperas artikolo pri sumoo ekde la 31a ĝis la 35a paĝoj.



Anonco!

Mi havas libron de Eugène de Zilah *La princo ĉe la hunoj*. Mi ricevis ĝin de franco senpage por tralegi kaj transdoni al iu alia legemulo. Jam kelkaj personoj en mia lando (miaj konatoj) tralegis ĝin kaj nun mi ŝatus transdoni ĝin al iu alia legemulo. Mi esperas, ke inter partoprenatoj de Esperanta-Sumoo tutcerte troviĝos iu, kiu ŝatus ĝin ricevi kaj post tralego sendi/transdoni al iu alia.

Mia retadreso burdo@poczta.fm

La libro estas vere leginda, miaopinie la plej bona originala libro, kiun mi legis ĝis nun, kvankam mi ankoraŭ havas du librojn de Trevor Steele (*Paradizo Perdita* kaj *Flugi kun kakatuoj*), kiuj probable ankaŭ estos bonegaj, kiel ĉiuj liaj libroj. Ekzemple lia "*Sed nur fragmento*" ankaŭ estas bonega, komparebla al *La princo* ... Mi havas priskribon, ne recenzon, de la libro *La princo ĉe la hunoj*, sed mi timas, ke ĝi estas tro ampleksa por aperigi ĝin sur la paĝo - recenzoj. Mi faris ĝin por la franco, kiu donacis al mi la libron, ĉar li plendis, ke iom "perdiĝis" en la herooj de la libro. Fakte estas multajn "rolantojn".


Estas multaj interesaj libroj kaj ne ĉiam oni povas kompari, ja ĉiu havas aliajn plaĉojn, aliajn interesiĝojn.

Amike, Dorota

Karaj Geesperantistoj!

Varbu luktistojn en viaj kluboj. Mi volas kolekti 500 luktistojn el la tuta mondo. En majo 2012 partoprenis 146 luktistoj en la tuta mondo kaj ili entute legis pli ol 13000 paĝojn. Mi volas, ke tiu Sumoo estu organizita en multaj landoj. Se ni povos kolekti 500 luktistojn, ni povos multe evoluigi la movadon, kaj eĉ ŝanĝi la movadon kaj la mondon.

Iniciatinto de Esperanto-sumoo HORI Yasuo: hori-zonto@water.sannet.ne.jp



La plej junaj luktistoj - lernantoj el Seattle (Usono)

Karaj gesamideanoj,

Dum nia lasta komuna “dumfadena” manĝo en Restaurant de la Poste, André GROSSMANN ŝovis al mi ekde alia fino de la tablo libron en la germana kun la titolo *Vom Kārlis zum Carlo – Zeit der Erinnerung Verlag Ravnerock*. Laŭ mia kutimo mi tuj tralegis la prezenton sur la lasta kovrilpaĝo. Ekde l'alia flanko de la granda tablo ion diris al mi nia svisa samideanino Anna-Lise Nicolodi-Nielsen, sed pro la distanco mi ne bone komprenis ŝin.

André konsilis al mi la legadon de la libro. Mi suspektas, ke li jam supozis, ke mi interesigōs pri ties temo kaj li eĉ sufloris al mi, ke ĝi meritis tradukon al Esperanto.

Hejmenveninte mi eklegis la libron kaj jam la postan tagon mi ĝin finis. Kontaktinte rete Anna-Lise, mi eksciis, ke la heroo de la libro estas ŝia forpasinta edzo Carlo Nicolodi.

Jesja! Kia vivo! La gepatroj de Carlo estis geesperantistoj kaj Esperanto por ili ludis la rolon de edzperanto! La esperantlingva latina instruistino Vera Milbrets inter la du mondmilitoj ekkorespondis kun la itala fervojisto Arturo Nicolodi, kiu tiam ekredaktis kune kun Franz Schick el Leoben (Aŭstrio) la gazeton *Internaciisto* kaj ekigis la asocion **IKEK (Internacia Komunista Esperantista Kolektivo)**.

Vera edziniĝis kun Arturo kaj ekloĝis en Sover, eta vilaĝo apud Trento (Italio).

Sed ekis la Dua Mondmilito kaj Arturo estis persekutita de la faŝisma reĝimo de Mussolini kaj Vera revojaĝis al Latvio kun sia en 1940 naskiĝinta filo Carlo.


En la libro Carlo, kiu en Latvio estis vokita Kārlis, rakontas sian novan vivon en por li fremda lando. Tra lia rakonto ni ekscias pri la vivo de latvoj dum la germana okupado kaj la posta soveta. Dume, en 1942, la patro Arturo estis enprizonigita en germana lagro.

Post la milito multegis la klopodoj por revenigi la filon kaj la patrinon al Italio. Tio sukcesis nur en 1953. Post infanaj jaroj kiel Kārlis en Latvio, Carlo nun devis sin adapti al la vivo en la nord-italia vilaĝo Sover.

E. L.

La germanlingva eldono estas havebla kontraŭ pago de 10€ aŭ 15 SF ĉe Anna-Lise Nicolodi en la Esperanto-klubo de Bazelo. La permeso por traduko al Esperanto jam estas donita de Anna-Lise Nicolodi Nielsen

La libro jam aperis en la dana lingvo.



Esperanto-horloĝoj

S-ro Fernando KINKANI N'KANU el Colmar proponas akiri tian unikan horloĝon, kun mencioj pri Esperanto sur la antaŭa kaj dorsa flankoj.

Ni proponas al vi sendi minimume 10 eŭrojn kaj eventuale 2 eŭrojn por la sendkostoj.

Jen kion skribas Fernando.

Karaj gesamideanoj saluton kaj bonan novjaron 2015,

La asocio Eŭro-Afrika Solidareco disvendadas la specialajn horloĝojn por esperantisto je minimume 10 eŭroj, sed eblas sendi pli multe plus la sendkoston. Tio sumo helpas la asocion plenumi sian projekton de la konstruado de lernejo en Angolo/Afriko kun la kunlaboro de TAKE-Esperanto. Aĉetu tiun horloĝon estas partopreni al la progreso de Esperanto en la mondo, ĉar la horloĝo havas bildon de la asocio Eŭro-Afrika Solidareco (personoj kun diversaj koloroj sin tenas manon kun mano en la mondo) por montri la solidarecon de esperantistoj malgraŭ iliaj diversaj koloroj, kulturoj, relegioj kaj landoj, ili kunlaboras.

Ankaŭ ĝi havas la verdan steleton, kiu gvidas nin. Malantaŭe, ĝi havas la skribon "Speciala horloĝo por Esperantisto" kun la bildo de ZAMENHOF kaj lia naskiĝdato kaj forpasdato. Sidejo en Colmar.

La personoj kiuj interesiĝas povas ĝin mendi al la adreso de la kaskisto de la federacio, S-ro André Grossmann aŭ al la adreso de S-ro Fernando KINKANI N'KANU, 4, rue d'Amsterdam 68.000 Colmar, telefono 0623188876 Membro de Eŭro-Afrika Solidareco

Kore dankas Fernando



En amikaj rilatoj kun BAVELO invitas vin al la :

77a Regiona Staĝo de Esperanto la 3/5ajn de aprilo 2015 en Collège Saint-Jean 73 rue de Blâmont, 55100 VERDUN



Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en Verdun samtempe kun la kongreso de SAT-Amiko. Tiel ni povos ĝui pri iuj komunaj programeroj, distraj vesperoj, turismado en Verdun aŭ al Batalkampoj.

La surloka organizado estas prizorgata de s-ino Catherine Kremer, profesia turisma gvidantino. Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Guillaume Armide

Vi trovos ĉi-poste la provizoran programon kaj aliĝilon al la staĝo.

Aliĝilo 77a Regiona Staĝo de Esperanto en Verdun la 3-5ajn de aprilo 2015 en Collège Saint-Jean, 73 rue de Blâmont, 55100 VERDUN

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ- kotizo	Elektita kurso
1		ĉef-aliĝanto			
2		kun-aliĝantoj			
3					
Adreso					

Provizora Programo:

Vendrede 3-an de aprilo 2015

- 17a Akcepto de unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti
- 19a30 Vespermanĝo
- 21a45 Malfermo de la knajpo.

Sabate 4-an de aprilo 2015

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Vizito al la malnova urbo
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de pliaj alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, B, kaj C.
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero: koncerte de Guillaume Amide

• Knajpo

Dimanĉe 5-an de aprilo 2015

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, B, kaj D
- 12a30 Tagmanĝo
- 14a Ekskurso al la batal-kampoj per buso kun ĉiĉeronado (25€)
- Poste, ebleco partopreni la programon de Sat-Amikaro

- A: Komencantoj (débutants)**
B: Progresintoj:
C: Paroliga kurso
D: Prelego:

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

André Grossmann
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

Ĉekoj nome de: André Grossmann

Internaciaj ĝiroj al: IBAN:

André Grossmann
FR6920041010150081934U03669

BIC: PSSTFRPPSTR

Por Germanio al nia peranto:

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.
(menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:

918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA
Ludwigshafen

Pliaj informoj ĉe :

catherine.kremer57@gmail.com

Tel. 03.29.85.05.09

poŝtel. 06.02.13.01.32

Telefono:	Ret-adreso:
-----------	-------------

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon:
 per ĉeko per ĝiro al André Grossmann per internacia ĝiro
 al nia peranto en Germanio Mi preferas vegetaran manĝon
 Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo
 kaj liston de proksimaj hoteloj (signu)

ALIĜOJ

Ĉef-aliĝanto abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio	25 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	4 €

Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj en collège Saint-Jean	Ven- drede 3	Sabate 4	Di- manĉe 5	Lunde 6	marde 7
Matenmanĝo 3 €					
Tagmanĝo 8,50 €					
Vespermanĝo 8,50 €					
Tranoktado en "Collège Saint-Jean: nombro da personoj 8 €					

Lito-prefero: individua lito duobla lito Litotuko 4,30 €
 Ĉambro-prefero en 3-persona 4-persona 5-persona
 Mi / Ni deziras partopreni dimanĉe posttagmeze la ekskurson al batal-kampoj (25 €)

Mi preferas tranokti en hotelo kaj petas rezervadon en Hôtel du Tigre:

Individua ĉambro 50 € <input type="checkbox"/> 2-lita ĉambro 66 € <input type="checkbox"/> ĉambro kun granda lito por 2 personoj 56 € <input type="checkbox"/>					
Matenmanĝo nombro da personoj 7,30 Ĉio pagenda en la hotelo mem					

KURSOJ

Gvidas Roberto Kueny

A: Komencantoj (débutants)

Cours pour débutants par GINETTE MARTIN. Elle apportera le matériel adéquat.

B: Progresantoj

C: Paroliga kurso tute en Esperanto.

D: Seminario:

Rodica Todor el Rumanio prelegos pri diversaj temoj rilate al Esperanto aŭ al Rumanio.



Ni lernu per distraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2								■	
3								■	
4			■						
5					■		■		
6			■						
7		■						■	
8					■				
9									

JG

HORIZONTALE

1. Mallongigo.
2. Panter'.
3. Baril'.
4. Sufikso. Malnobla fripon'.
5. Muvu objekton turnante ĝin ĉirkaŭ ĝi mem. Patr' de patro.
6. Konjunkcio. Ligi denove.
7. Rand'.
8. Naĝbird'. Larm'.
9. Haŭtmalsano.

VERTIKALE

1. Longedaŭra deklar' antaŭ publiko.
2. Preskaŭsanktul'. Partikulo.
3. Part' de teatra aktoro. Marbird'.
4. Ŝatad' de nuraj korpaj ĝuoj.
5. Kapo de vasalo! Sufikso.
6. Loĝant' de sudokcidenta azialando. Regnokodo de Portugal.
7. INVERSE:Varmega. Kudrita faldo de ŝtofpeco.
8. Polurebla minerala silikat' el alumino. INV:Litera nomo.
9. Optika aparato por okulo.



Iun tagon, kruela hundo trovis en grenejo katinon kun kvar katidoj. La malbona besto pelis ilin en angulon. La kompatinda katino timis ĉar la danĝero pligraviĝis! Subite la kuraĝa katino ekstaris sur la malantaŭaj piedoj kaj grumblis kaj bojis... Vere, ĝi grumblis kaj bojegis... Tiuj neatenditaj sonoj tiel perpleksigis la hundon, ke ĝi rapide forkuris. La katino turnis sin al la katidoj kaj fiere diris : "Nun vi scias, kiel utile estas, scipovi duan lingvon! "

Komercisto kaj dungito

Komercisto, kiu ĵus dungis junulon por helpi lin en magazeno, klarigas al li:

- Nu! Komence, zorge balau la tutan butikon. . .
- Sed, malkonsentas la junulo, ne forgesu, ke mi studis, kaj ĵus ricevis diplomon pri filozofio.
- Mi pardonpetas, diras la komercisto, mi jam forgesis tion. Tiuokaze, venu ĉi tien, por ke mi montru al vi, kiel teni balailon!

Per monbileto de 100€

Tio okazas en vilaĝo, kiu vivadas dank'al turismo, sed pro ekonomia krizo, turistoj ne plu ĉeestas. Do por vivteni ĉiuj prunteprenas de ĉiuj.

Fine, post pluraj neenspezigaj monatoj, vojaĝanto alvenas en la vilaĝon, kaj petas ĉambron en la hotelo, pagante ĝin per unu monbileto de 100€.

La turisto estas ankoraŭ eniranta en sian ĉambron, kiam la hotelisto jam ekkuras al viandisto, por enmanigi al li la ĵus-ricevitan bileton, kies sumon li ŝuldas.

Tiam la buĉisto tuj poste kuras alporti tiun bankbileton al kamparano, kiu viandproviantis lin.

Senprokraste la kamparano siavice hastas al amoroŝtino por repagi kelkajn malnovajn elspezojn ĉe ŝi.

La amoristo rapidas iri en la hotelon de la komenco de la rakonto por pagi al la hotelisto ŝuldatan koston de la ĉambro, kiun ŝi luis hore por sia laboro.

Sed ĝuste kiam ŝi demetas la bileton de 100€ sur la akceptejan tablon, alvenas la turisto, kiu diras al la hotelisto, ke finfine la ĉambro ne plaĉas al li kaj ne plu volas ĝin. Dume li reprenas sian monbileton, kaj tuj eliras.

Tamen estas bona novaĵo, ĉar nenio estis elspezita, nek enspezita, nek perdita, kaj nun ŝuldon neniu en la vilaĝo havas.

Ĉu estas rimedo por solvi tutmondan ekonomian krizon?

Dankon al niaj kontribuantoj
Joël GRANDJEAN kaj Catherine Hel

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2015 ĝis 2017

La abon-periodo 2014 jam finiĝis per la lasta numero 168. Ĉi-tiu numero 169 jam estas la unua de la jaro 2015. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 170 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2015.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvantaj jaroj 2016 - 2017

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "Fino de abono!!", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2015. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

		Jaroj:	2015	2016	2017
		Abono por adresoj en Francio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
		Abono al reta versio	7,50 eŭroj	7,50 eŭroj	7,50 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA	MG	• Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.			11 eŭroj
	MJ(-T)	• Individua Membro kun Jarlibro (kaj inkluzive ĝis 29 jaroj, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago).			26 eŭroj
	MA(-T)	• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto			64 eŭroj
Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2015 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2015, 2016 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.				
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)				
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)				

J A R KOLEKTO DE TAKE 2015

JARKOLEKTO de TAKE 2015 estas bel-aspekta libreto en formato A5 kun 68 paĝoj. Ĝin redaktis Pierre Grollemund el Francio. Kvin aŭtoroj kontribuis per artikoloj por tiu teknika verkaĵo. Ĝin ricevis ĉiuj membroj de TAKE. Ĝi estas ankaŭ aparte akirebla por 6 eŭroj (sendkostoj inkluzivitaj). Nia propono: se vi pagas 12 eŭrojn, vi ricevos la JARKOLEKTON de TAKE 2015 kaj estos membro de TAKE por la jaro 2016.



JARKOLEKTO DE TAKE 2015

ENHAVO	Hidroizolado Pierre Grollemund
Novtipa forno Walter Klag	Pri Rémy BOUCHET Pierre Grollemund
La Ŝanhaja Turo plej alta Pierre Grollemund	Transborda ponto apud Rochefort
Pasiva burodomego en Vieno Walter Klag	La romia Akvodukto ĉe la rivero Gard Pierre Grollemund
Muzeo de la Kunfluejoj PLU Pierre G.	Masoni per kanabaj brikoj Pierre G.
La Domo de la Laboro en Saint-Etienne P.G.	Objektoj en la strato Pierre Grollemund
Esperantistaj arkitektoj Henri Masson	Konstruado de parkejo Roger Condon



Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

GRAVEGA EVENTO: ALTERNATIBA 2015

La unua Alternatiba okazis en Bajono (Eŭskio) la 6an de Oktobro 2013 kun la frapfrazo]:

**"Ni ŝanĝu la sistemon, ne la klimaton!
Kune ni konstruu pli bonan mondon,
akceptante la klimatan defion".**

- 300 asocioj aŭ individuoj mobiliziĝis, 500 volontuloj, 12 000 vizitantoj,
- budoj, preleg-debatoj, skeĉoj, muziko. . .
- aliaj urboj, Bordoza 15 000 vizitantoj, 10 000 Nanto, Lillo. . . . kreis aŭ preparas siajn Alternatiban eventon, inter pli ol pli ol 50 urboj en la mondo.

Kiu estas Alternatiba?

Estas grupo de homoj, kiu kreskas, vi, mi, ĉiuj, kiuj jam agadas aŭ deziras agadi por konstrui socion pli justan, pli harmonian, pli respektaman de la rajtoj de la estontaj generacioj.

Kio estas Alternatiba?

- La scio:** prezenti al la ĝenerala publiko,
- *la multajn alternativojn* al troa konsumismo de produktoj de industrioj, kiuj bezonas multe da energio, troa konsumismo proponata de nia ekonomika sistemo
 - *kaj la ekziston de solvoj, kiuj respektas la rajtojn de ĉiuj.* Ekzemple:
 - ŝparadoj pri energio, pajla aŭ ligna mem-konstruado, daŭranta-kulturo (lokaj semoj, alternativaj kultivado kaj energifonto) , uzo de biciklo, ekologia, etika kaj loka aĉeto
 - AMAP (asocioj inter konsumantoj kaj ekologia terkultivistoj) lokaj monoĵoj, la produktado kaj interŝanĝo de semoj, reuzo de la elĵetaĵoj, k.t.p. . .
 - Asocioj por socia justeco (ATTAC= asocio por taksu la monajn internaciajn interŝanĝojn, k.t.p.), por solidareco (senpaga deponejo),
 - LIS (lokaj interŝanĝoj senmonaj) ,
 - Retoj por interŝanĝoj pri scioj k.t.p.),
 - Asocioj por plibonigi la homajn rilatojn (neperforta komunikado, antaŭenigo de la "Packonstruantoj, pozitiva Edukado, internacia etika komunikado, alirebla al ĉiuj per la justa lingvo "Esperanto", k.t.p. .).

Kundivido:

Alternatiba, tio estas loko, kie oni kundividigas informojn. En ĝi vi povas prezenti viajn ideojn, atingojn, dokumentajn informojn, . . kaj konigi vin.

La festo:

Alternatiba estas populara festo, kun festaj manĝoj, artaj vagadoj, kantadoj, dancadoj, skeĉoj, klaŭnoj, k.t.p.

La solvoj:

Alternatiba montras, ke la solvoj al la malreguliĝo ekzistas, kaj, ke plie, ili konstruas socion kaj vivon pli humanajn, pli justajn, pli solidaraĵajn, pli afablajn, kaj finfine pli dezirindajn.

Kie estas Alternatiba?

Ĉie!

Kreu eventon aŭ partoprenu en iu Alternatiba evento aŭ al etapo de la tandema francaĵa rondirado, apud de ĉe via urbo.

Aliparte, ĉie, homoj kutimas kune marŝadi, bicikli, por siaj sano kaj plezuro. Ĉu ne eblus propopi al ili, ke kune, ili organizu (se eblas kun via helpo), du festetojn

- ĉirkaŭ la vendredon la 5a de junio (foriro de Bajono)

- ĉirkaŭ la lundon la 26a de septembro (alveno en Parizo)

- Petu detalojn ĉe

[<espergala@wanadoo.fr>](mailto:espergala@wanadoo.fr)

La Francaĵa Rondiĵo konsistas el kuraĝuloj, kiuj biciklos dum 5000 kilometrojn en 180 etapoj en Francio kaj kelkaj bicikladoj en kvin najbaraj landoj, en kvarsidloka tandemo de la 5a de junio ĝis la 26a de septembro 2015.

Kial Alternatiba?

- Por pli konscientigi maksimumon da homoj, la amaskomunikilojn, pri la urĝa neceso de ŝanĝi niajn kondutojn,

- kaj premi la decidantojn, por ke en la internacia kunveno en Parizo en decembro 2015, ili precize devigu sin por bremsi tiun klimatan varmiĝon, tiom danĝera ĉefe por iuj landoj. . . .

☐ *Esperantistoj tradukis en esperanton la parolojn de la 35 minuta filmo*

<https://www.youtube.com/watch?v=BP-IYAFyPFE>.

Bonvolu ĝin distribui al viaj internaciaj rilatoj.

Partoprenante al disdono de tiu mesaĝo, vi energie partoprenos en la ŝanĝo, kaj samtempe antaŭenigos la uzon de Esperanto en la internaciaj rilatoj.

Pli da informoj ĉe:

[**https://alternatiba.eu/Kontakttoj**](https://alternatiba.eu/Kontakttoj):

Emile Mas espergala@wanadoo.fr kaj

Philippe Stride: philippe.stride@gmail.com

Mia vojaĝoj tra Irano

Raportas Bruno Henry



Delonge mi pensis vojaĝi al Irano kaj Istanbulo en Turkio por viziti vindindaĵojn kaj malkovri kulturon kaj popolojn. Mi jam sciis, ke aktivis E-movado en Irano kaj eblas vojaĝi trajne de Eŭropo al Irano kaj uzi la “Pasportan Servon”.

Mi vojaĝis ĉefe per trajno dum sep semajnoj en julio kaj aŭgusto 2012, vizitis Iranon dum tri semajnoj kaj etapis en aliaj landoj dum kelkaj tagoj.

Mozelo kaj Rejno

Frumatene mi forveturis trajne de Thionville kaj post la ĉefurbo Luksemburgo mi laŭiris la riveron Mozelo kaj la riveregon Rejno kiuj estas tre romantikaj ĉar staras fortikaĵoj kaj kasteloj sur la pinto de montetoj.

Alpoj

Vespere la trajno transiras Alpojn de Aŭstrio ĝis Slovenio grimpante super valoj kaj belaj pejzaĝoj.

Beogrado Serbio

Post 24 horoj da trajnveturado tra Luksemburgio, Germanio, Aŭstrio, Slovenio, Kroatio kaj Serbio, matene mi rendevuas en Beogrado kun Dimitrije kaj lia amiko. Ni babiladas pri eks Jugoslavio kaj ili tre bedaŭras la dispartigon de la lando, la malkuniĝon kaj la abomenaĵojn de la milito kiu okazis en Jugoslavio.

Beogrado estas agrabla urbo pli trankvila ol Parizo. Kelkajn ŝpurojn de la milito mi vidas kiel la ministrejo de armeo kiun NATO bombadis en la jaro 1999.

Mi gustumas bongustajn Ĉevapiĉi (rulumita kaj rostita viandaĵo kun cepoj kaj kremoj). Mi restadis du tagojn en Beogrado.

Sofio Bulgario

Post unu nokto da veturado, inter du

trajnoj mi vizitis Sofion, la ĉefurbon de Bulgario. Mi demandis al maljunulo, kie estas la ortodoksa katedralo Aleksandro Nevski. Li respondis bone al mi en la franca lingvo! Surstrate kiam mi demandis, kie estas la stacidomo kelkaj homoj kapablis respondi al mi en la fran-



ca! Multaj bulgaroj lernis la francan en la lernejo oni diris al mi.

Istanbulo Turkio

Post unu nokto en trajno mi atingis Istanbulon kiu estas giganta urbo. Estas la plej grava urbo pri ekonomio kaj kulturo en Turkio, en kiu loĝas 14 milionoj da loĝantoj. Ĝi estis ĉefurbo de tri imperioj kaj nomiĝis antaŭe Bi-

zanco, Konstantinoplo kaj Stribulo. La historio de Istanbulo komenciĝis antaŭ 8 000 jaroj! Mi vizitis la bluan moskeon “Sultanamet” kaj la moskeon Sankta Sofia “Ayasofya”. La arkitekturo estas impona kaj mirinda! Kolonoj, muroj estas riĉe ornamitaj per arabeskoj kaj kaĥelaroj el fajenco.



Mi tre ŝatas la kvietan etoson de la moskeoj. Ankaŭ oni povas ripozi ĉar la aero estas pli freŝa ol ekstere! Estas pli bone viziti surloke tiujn monumentojn ol rigardi filmojn aŭ fotojn pri ili!

Multaj turistoj el la tuta mondo vizitas tiujn famajn moskeojn kaj la urbon. Mi aŭdis lingvojn el la tuta mondo!

En la granda bazaro de Istanbul oni vendas ĉion!

Istanbul ĉirkaŭas la markolon Bosforo (inter Eŭropo kaj Azio, ĝi interligas. . .) kaj la golfon Ora Korno. Multaj ŝipoj traveturas ilin por transporti milojn da homoj al diversaj flankoj de la urbo.

La antaŭlastan tagon en Istanbul mi renkontis esperantiston Can, kiu loĝas en la azia parto de la urbo. Li gvidis min en la urbo kaj ni vespermanĝis en lia hejmo kun liaj fratino kaj patrino. Li rakontis al mi ke la E-movado estas malforta en Turkio sed esperantistoj instruas Esperanton.

Ofte mi manĝis en malmultekosta restoracio apud la stacidomo Sirceci. La turka manĝaĵo estas tre bongusta kaj fama.

Trans Azia Ekspres'



Post kvin tagoj en tiu mirinda urbego, mia amiko Can gvidis min al la buso al Ankaro ĉefurbo de Turkio. Post unu nokto en buso mi alvenis frumatene en Ankaron. De tie mi veturis per trajno nomita "Trans Azia Ekspres'" al Teherano ĉefurbo de Irano. Entute tiu vojaĝo daŭris 72 horojn por 3000 km, 3 noktoj kaj 2 tagoj!

En la kupeo tre afabla iranano donas al mi rizon, panon kaj kukon. Bedaŭrinde, mi ne povis interbabili, ĉar li parolis nur en la persa lingvo. Alia iranano gvidis min al kuŝvagono por babili kun francaj junuloj. Ili veturis al la lago Van en Kurdio regiono, kiu situas oriente de Turkio. Mi rakontis al ili, kio estas Esperanto. Ili miris ke mi vojaĝas al Irano ĉar malmulte da eŭropanoj vizitas ĝin ĉar ili opinias, ke Irano estas danĝera islama lando!

La turka trajno veturis malrapide tra la montaro kaj laŭ tumultaj riveroj, valoj kaj kamparo. Vespere ni traveturis dum 4 horoj la belan lagon Van, 100 km-ojn longan per pramŝipo. Ĝi estas blua kaj ĉirkaŭata de montaroj.

Ĉe la transa flanko, nin atendis irana trajno. En la kupeo mi konatiĝis kun du francaj homoj patro kun filino, kaj kun slovenoj. Ni interŝanĝis niajn informojn pri Irano kaj mi rakontis al ili pri Esperanto.



Post la landlimo ni ĝustigis nian brakhorloĝon kaj aldonas 2H30. Ni ankaŭ ŝanĝis kalendaron, ĉar ekde tiam ni uzis en Irano muzulmanan kalendaron. Ni estis en la jaro 1391 kaj en aliaj landoj estis la jaro 2012. La skribaĵo estas araba sed la lingvo estas persa, ĉar irananoj ne estas araboj sed azia popolo.

La irana trajno serpentumis malrapide tra sekaj montaroj kovritaj de kelkaj kreskaĵoj. Kelkaj ŝafaroj paŝtiĝis kun hundo kaj ŝafisto. De tempo al tempo aperis izolitaj domoj aŭ vilaĝoj.

Posttagmeze la trajno haltis en stacidometo kaj la konduktoroj elvagoniĝis por preĝi en la moskeo apud stacidometo. Varmegis ĉi tie!

Je la unua matene Hamzeeh akceptis min en la stacidomo de Teherano kaj veturigis min al Giti.



Teherano Irano

Teherano ĉefurbo de Irano estas giganta kaj enhavas ĉirkaŭ 12 milionojn da loĝantoj. Konstruataj domegoj kaj turoj multegas. Sed kelkaj kvartaloj aspektas vilaĝoj. Rande de la urbo oni kreskigas legomojn kaj arbofruktojn en ĝardenoj kaj kampoj. Tiu urbo estas konstruita piede de la montaro Alborz, kies plej alta pinto estas 5601 metrojn alta. La trafiko estas tre densa kaj danĝera. Oni ne respektas la "leĝon". Regas la leĝo de la plej forta homo. Multegaj motorcikloj pafkrakas kaj zigzagas inter la veturiloj. Aŭtoj hupadas konstante! Pro densa trafiko poluado kreskas, malbonodoras kaj nuboj flugas super la urbo. Pro tio kelkfoje oni ne bone vidas la pinton de la montaro!

Giti gvidis min dum tri tagoj por viziti Teheranon. Ni vojaĝis per metroo kaj busoj. Kelkaj metrovagonoj



estas rezervitaj por virinoj. Tamen virinoj povas akompani edzon aŭ konatulon en aliaj metrovagonoj. En la urba buso la antaŭa parto estas por viroj kaj la malantaŭa parto estas por virinoj. Kelkaj viroj en metroo rimarkis ke mi estas eksterlandano kaj faris demandojn al Giti, kiu mi estas. Ŝi diris ke mi estas franco kaj ke ni interparolas en Esperanto. Ŝi klarigis al ili, kio estas Esperanto. Ni vizitis la reĝan palacon Golestan de eksa Ŝao Sha Reza PALHAVI. Li estis la eksa irana reĝo kaj en 1979, revolucio forpuŝis lin. Tiu palaco estas ornamita lukse kaj riĉege. Ankaŭ en Teherano estas granda bazaro, kiel en Istanbulo, kie mi vidis en butikoj grandajn persajn belajn tapisojn!

Mi vespermanĝis post la noktiĝo, kun familianoj de Giti. Tiam dum preskaŭ mia tuta restado okazis ramadano. Do, ĉiuj trinkis kaj manĝis post noktiĝo. La restoracioj ne funkciis la tutan tagon. Ni manĝis sidante sur la ŝeroj kaj sur tapiŝoj. Muziko estas aŭdebla. Ni manĝis rizon kun safrano, kokidaĵojn, salatojn kaj diversajn bongustajn dolĉaĵojn. Filo de Giti kun edzino kaj la bogepatroj de filo estas tre afablaj kaj simpatiaj. Ili faris demandojn pri nia vivo en Francio kaj demandis al mi kion opinias francoj pri Irano. Homo dancis, kun giganta kapo de kuiristo surŝultre, laŭ bela irana muziko. Oni diris al mi, ke en Irano oni ne rajtas danci! Tre bedaŭrinde!

Tiam mi pasigis tri tagojn ĉe Surush kaj Zore. Ni iris aŭte al infanĝardeno, kie Zore estas direktorino. Zore montris al mi la ĉambrojn, kie lernas aŭ ludas la infanoj. Tie Zore instruas la anglan al kvin-jaraĝaj geknaboj. “Ĉiuj gepatroj volas, ke iliaj gefiloj lernu la anglan” diris al mi Zore. Verŝajne tio multe amuzas ilin. Mi estis kuriozaĵo ĉi-tie! Oficisto de la urbodomo venis tien kaj invitis min viziti sian oficejon.

Ni vizitis Nasrin la fratino de Zore. Nasrin kaj Zore estas fratinoj kurddevenaj. Ni tagmanĝis kaj vespermanĝis post la noktiĝo sub laŭbo en nova granda parko. Temperaturo estas pli freŝa ol en la domo. Mi ludis per domenoj, kun Seper dek-jara filo de Zore kaj Surush kaj poste kun Aida dek ok-jara filino de Nasrin kaj

Scharam, mi ludis per ludiloj de la parko.

Fine de mia restado en Teherano, Hamzeeh kaj lia edzino kaj du filinetoj gastigis min tri tagojn. Hamzeeh gvidis min por viziti la turon Azadi. Ĝi estas 48 metrojn alta betona konstruaĵo kun enormaj piedoj kiel la Eifelturo en Parizo. Ŝao Reza PALHAVI konstruigis ĝin antaŭ 40 jaroj. Ene estas mirinda muzeo pri belaj diverskoloraj ŝtonetoj. . . ankaŭ roboto ludas pianon!

Kun Hamzeeh, lia edzino kaj la filinetoj ni forveturis aŭte norden de Teherano al la parko Jamchidihyeh, je unu horo da veturado. La parko etendiĝas ĉe la altaĵoj de la montaro. Verdiĝanta arbaro, rokoj kaj panoramo super la ĉefurbo donas bonajn kialojn por veni tien. Ni trovis ĉi-tie malvarmeton sub la arboj kaj ankaŭ dank'al akvo, kiu rapide malsuprenfluas de la montaro tra kanaletoj laŭlonge de la vojoj. Tio bonefikis ĉar en la urbo regis varmego. Hamzeeh kaj mi decidis grimpi sur la ŝtuparo, kiu kondukas al rigardejo, ĉe la supro de la montaro. De la supro ni admiris la panoramon de la giganta Teherano, kiu etendiĝas laŭ 100 kilometroj ĉirkaŭita de montaro. Vento ne multe blovis sur tiu urbeĝo. Pro tio, vualo, formita pro poluado, stagnas super Teherano blokita inter montaro. Pli malmultis la vualo ĉar okaze de ripoztago. Ni malsupreniris kaj nombris la ŝtupojn. Estis 550 ŝtupoj entute!



Isfahano Irano

Post unu nokta busveturado de Teherano mi alvenis matene, kun Giti je la kvina en urbeto antaŭ Isfahano. Giti petis de la bus-ŝoforo halti ĉe la rando de la aŭtovojo sub ponto. La edzo de Farshide venis kun sia aŭto por ŝofori nin al sia domo. Pro ni, tiuj homoj ne dormis la tutan nokton por akcepti nin. Ili varme akceptis nin kun sia juna filino por du tagoj.

Ni vizitis la ĉefan palacon, kie staras du belaj moskeoj kovritaj per blua ceramikaĵo. Tutcerte estas unu el la plej belaj en la mondo. Ni ankaŭ vizitis la palacon de la ŝaho. Isfahano estis ĉefurbo de la persa imperio kun granda civilizacio. En la bazaro estas multe da metiistoj, veraj artistoj, kiuj prilaboras el kupro kaj stano (metalo griza kaj facile fandebila) telerojn, kruĉojn, kulerajn, soldatojn, ankaŭ latunaĵojn, (flava alojo el kupro kaj zinko), ledaĵojn (felo preparita por industriaj uzoj: ŝuoj, rimenoj kaj aliaj), kaj kaligrafiaĵojn. Ili laboradis antaŭ ni.

Yadz Irano

De Isfahano ĝis Yadz ni busveturis posttagmeze. Yadz estas fama urbo en Irano pro sia tre bongustaj kukaĵoj kaj sukeraĵoj. Mi frandis ilin!

Sabate ni vizitis la malnovan urbon kun ĝiaj domoj konstruitaj per argilmasonaĵo. Mi vidis ĉe la supro de domoj inĝeniajn ventokaptilojn, iam nomatajn “ventoturoj” “badgir”.

Temis pri vertikala strukturo apud domoj (privataj aŭ publikaj) por enirigi venton en la internon de la konstruaĵoj por malvarmigi per akvo la venton kaj sekigi la enajn spacojn. Ventokaptilo aspektas kiel tureto kovrita ĉe la supro, kaj ĉe la vandoj estas vertikalaj fendetoj, por ke eniru la aero.

Tie, ni estis ĉe la rando de la dezerto: 35 gradojn kaj pli varmis ol en Teherano kaj Isfahano.

Elirante de la prizono de Aleksandro, francoj alvokis min. Estis Olivier kaj lia filino Laura, kiujn mi renkontis unu semajnon antaŭe en la trajno ĉe la landlimo inter



Turkio kaj Irano. Ni interŝanĝis pri niaj vojaĝoj kaj tagmanĝis kune en restoracio.

Ŝirazo Irano

De Yadz al Ŝirazo ni busveturis en la posttagmezo. Ŝirazo estas 850 kilometrojn for de Teherano. Ekde Nilvange (apud Thionville), mia urbeto, mi veturis ĉirkaŭ 7000 kilometrojn ne veturante aviadile! Tiamaniere mi scias, kiom longa estas la distan-

co kaj kiaj estas la pejzaĝoj vojaĝante kun popoloj.

Kiam mi rigardis la mapon mi surprize konstatis, ke mi estis ĉe la plej fora punkto de mia vojaĝo. Ŝirazo estas pli fora ol Bagdado kaj Kuvajto!

Ŝirazo estis ĉefurbo de Persio. Ĝi enhavas 1,5 milionon da loĝantoj kaj estas grava urbo ĉe la vojo al Persa Golfo. Vespere akceptas nin Mohammad, kun edzino kaj filino Fatima.

Dum du tagoj ni vizitis diversajn vizitindajn lokojn de Ŝirazo: moskeoj, belegaj ĝardenoj, fortreso flankita de oblikva turo, kvazaŭ la turo de Pizo kaj maŭzoleo de irana, famkonata, ŝatata poeto Saadi, kiu vivis en la mezepoko.

Mi admiris la Maŭzoleon Shah Cheragh. Ĝia kupolo estas turkisa kaj facado estas



en blua faïenco. Ene la grandaj ĉambroj estas kovritaj kaj ornamitaj per miloj da speguloj kun alveol-forma kupolo.

Persepoliso Irano

Ni forveturis per taksio al Persepoliso, 65 kilometrojn norde de Ŝirazo. Persepolison konstruigis Dariuso la unua reĝo de Persio en 518 antaŭ Kristo, cele al prestiĝa ĉefurbo de la persa imperio.

Tiu mirinda palaco impresis min. Altaj kolonoj staras de longaj jaroj. Iuj estas kovritaj per ĉapelo en formo de virbovo kaj leonoj.

De Ŝirazo ĝis Isfahano ni busveturis posttagmeze. Poste ni pasigis la tutan nokton en kuŝvagono kun simpatia

irana familio, kun infano, ĝis Teherano kie Hamzeeh akceptas nin.



Rascht Kaspia Maro Irano

De Teherano ĝis Rascht la distanco estas 300 km en 5 horoj per buso. Rascht situas norde de Irano, ĉirkaŭ 30 kilometrojn for de la Kaspia Maro. Ĉi-tie oni parolas alian lingvon ol la persa, la Gilakan.

La kreskaĵoj pli kaj pli densiĝas kun arboj, kampoj kaj herbejoj. La kontrasto estas okulfrapa ĉar aliloke, unu triono de Irano estas seka duondezerto kaj tre varma. La temperaturo estas malpli alta ol en Nilvange, ĉirkaŭ 35 gradoj. Sed la atmosfero estas tre peza, ĉar en tiu regiono la klimato estas tre humida.

Akbar rakontis al mi pri sia urbo, kiu enhavas 650000 milojn da loĝantoj!

Tiu regiono estas pripluvita kaj humida. Tio ebligas kultivi rizon, kiu estas irana baza manĝaĵo. Tie oni kultivas multajn diversajn

legomojn. Silkon (Delikata kaj brila fadeno sekreciita de iu speco de raŭpo) ankaŭ tabakon, kaj teon oni produktas. Oni fiŝkaptas sturgon (primitiva rabofiŝo, iom ŝarkoforma, vivanta en eŭropaj maroj, sed preskaŭ formortinta) en la Kaspia Maro por elpreni kaviaron, kiun oni eksportas.

Kun Akbar, per aŭto, ni veturis al Bandar-e Anzali, haveno ĉe la Kaspia Maro.

Mi malkovris la Kaspian Maron. Ĝi estas blua verda kaj moviĝas multe. La irananoj de aliaj regionoj ŝatas sin bani tie, ĉar malpli varmas. En la sudo ĉe la Persa Golfo la temperaturo superas pli ol 40 gradoj! Nuntempe estas malpermesita naĝi ĉar la ondoj estas altaj. La malpermesita rando de la plaĝo kaj ĉe la maro estas limigita per ŝnuro. La naĝgardisto fajfas al tiuj homoj, kiuj sin riskas transpasi la ŝnuron. Multaj homoj sin banas. La virinoj sin banas tute vestitaj kun kaptuko. Kiam eblas naĝi la virinoj kun bankostumo sin banas en virina rezervita parto, kiu estas kaŝita per granda tolaĵo kontraŭ la vido de la viroj. La akvo estas agrabla kaj varma. La fundo estas malprofunda.

La Kaspia Maro ĉirkaŭbanas Rusion, Kazakion, Turkmenion, Azerbajĝanon kaj Iranon.

Poste ni veturis al Fuman, ĉefurbo de Krakeno "kalouches". tio estas rondforma kuko kun nukso kaj cinamo (Aroma ŝelo de cinamujo, uzata kiel spico). Monumento honore al tiu kuko staras en la urbocentro. Ni frandeme etapis por gustumi krakenojn vere bongustajn kaj dolĉajn!

Ni iris al Mansouleh je altitudo de 1500 metroj. La vojturniĝoj pli kaj pli mallarĝiĝis kaj la deklivo krutiĝis. La unuaj kremkoloraj domoj ekaperis. Konstruitaj ĉe la flanko de montetoj, ili ŝajnas kvazaŭ supermetitaj! Inter

la loĝejoj, stratetoj direktas al bazon! La pitoreskaj domoj en okra tono estas terase konstruitaj ĉe la flanko de la montaro kaj sur la plataj tegmentoj kuŝas stratetoj. Tiumaniere oni povas marŝi sur la tegmentoj de la malsupraj stratetoj! Strange por mi! Turistoj estas nur irananoj.

Ni ne renkontis eksterlandanojn. La vilaĝo vicigas multajn butikojn kaj restoraciojn. Poste ni iris per vojeto direkte al la kastelo, kiu staras en la arbaro. Akbar nomas tiun kastelon "Rivera kastelo".

Piede ni grimpis ŝtuparon, kiu laŭiras proksime de to-

rento. Miloj da irananoj, piknikas aŭ tendumas laŭ la vojeto kaj la torento ĉar tie estas ombro kaj freŝeco. Staras budoj kovritaj per ŝirmtoilaĵoj, kie oni vendas turist-memoraĵojn, kekabojn, trinkaĵojn kaj regionajn produktaĵojn, kiel tiu karbokoloran konfitajon.

La kreskaĵoj estas abundaj en tiu mirinda natura loko. Bedaŭrinde multajn rubaĵojn oni forlasis tie, plastajn sakojn, plastajn botelojn ktp. . . Troviĝas malmulte da rubujoj.

Post tri tagoj en Rascht kiam mi forveturis al Teherano la buso preterpasis grandan elektran baraĝon, kiu tenas grandan lagon, kiu ricevas akvon per larĝa torento. Ĉe la rando de la lago aperas pluraj ventogeneratoroj. Tiu lando enhavas multajn energiajn riĉofontojn: petrolon, venton kaj sunon.

Mi finis mian restadon ĉe Hamzeeh en Tehrano kaj busveturis de Teherano al Istambulo 3000 km-ojn for en 35 horoj. Bedaŭrinde ne plu estis loko por mi en la trajno kiu veturis unufoje en la semajno al Ankaro!



Vivo kaj impresoj pri Irano

Oni uzas en Irano muzulmanan kalendaron. Ni estis en la jaro 1391 kaj en aliaj landoj estis la jaro 2012. La skribo estas araba sed la lingvo estas persa. La ciferoj ne estas arabaj sed persaj (ili devenas el Hindio). La irananoj ne estas araboj sed azia popolo. Vendredo en Irano estas kiel dimanĉo en Francio neniu laboras.

Kiam okazas fasto oni ne rajtas trinki kaj manĝi dum la tago sed post la sunsubiro oni povas manĝi kaj trinki. Nur la vojaĝantoj povas manĝi kaj trinki.


Viroj rajtas surmeti ĉemizojn sed ne mallongajn pantalonojn. Virinoj eĉ eksterlandaj devas surmeti kaptukon. Oni manĝas per kulero kaj tranĉas per forketo.

En necesejo necesas forlasi la pantoflojn kaj surmeti plastajn sandalojn.

Foje irananoj diris al mi ke multaj eksterlandanoj opinias, ke irananoj estas teroristoj! Pri tio ili ne konsentas. "Vi ne havos problemojn kun irananoj" ili diris al mi.

Mi spertis neniajn problemojn kaj streĉojn ĉi-tie. Irananoj estas agrablaj kaj gastemaj kun eksterlandanoj. Ili tre ŝatas alilandanojn kaj emas scii pri ili. Mi fartis bone en tiu lando! Amas-komunikiloj en Eŭropo ne montras bonan bildon pri Irano. Sed la realeco estas tute alia.

Multaj irananoj estas kleraj, ŝatas poezion. Virinoj estas



pli nombraj ol la viroj en la universitatoj. Multaj virinoj ne emas surmeti kaptukon! Irananoj ŝatas infanojn kaj zorgas pri maljunaj gepatroj. Multaj plendas pro la registaro. Ekonomia situacio estas tre malbona: senlaboreco kreskas, ĉiuj prezoj altiĝas konstante, pli rapide ol la salajroj, kelkfoje laboristoj ricevas malfrue sian salajron. Prezo de benzino duobliĝis. Teokratio kaj mualoj (di-servanto ĉe islamanoj premas la homojn): ne estas esprim-libereco, liberaj amas-komunikiloj, homoj ne rajtas manifestacii, virinoj devas surmeti kaptukon, malpermeso trinki surstrate dum ramadano. Religia polico nomita "Gasht e Ershad" (Polico de la Virto) kontroladas, ke la virinoj estu kovritaj de la kapo ĝis la piedoj. Por la viroj ili estas pli toleremaj ĉar kelkaj viroj surmetas ĉemizojn kun mallongaj manikoj.

Oni ne rajtas kanti kaj danci publike en Irano. Kelkaj gekantistoj kantas eksterlande!



Trojan Bulgario

Post la busa vojaĝo de Teherano al Istambulo mi pasigis unu tagon en tiu ĉi bela urbo por ĝui la etoson en moskeo. Vespere mi forveturis de la stacidomo Sirkeci kaj post 24 horoj mi atingis Trojan Ĉie tie gastigis min fervojista amiko Pavlin en urbeto Trojan ĉe la montaro Balkano. Mi prelegis pri Irano por esperantistoj kaj emerituloj. Pavlin tradukis en la bulgaran lingvon. Oni faris multajn demandojn pri la vivkondiĉoj de virinoj en Irano.



Bukareŝto Rumanio

Post tri tagoj en Trojan kaj unu nokto en trajno mi trarigardis Bukareŝton ĉefurbon de Rumanio dum kelkaj horoj inter du trajnoj. Mi jam vizitis ĝin en 1981. En tiu epoko ĝi aspektis tre aŭstera sed enhavis malnovajn kaj



tipajn kvartalojn kun belaj prejeĝetoj. Bedaŭrinde eks-prezidento Ceaucescu malkonstruigis ilin por starigi gigantan parlamentejon kaj domegojn por loĝigi ŝtatajn oficistojn.

Balatonederics Hungario

Mi forveturas vespere de Bukareŝto per nokta trajno ĝis Budapeŝto kaj ŝanĝas trajnon ĉie-tie por veturi al la lago Balatono. Otto mia malnova amiko gastigis min en vilaĝo Balatonederics apud granda lago Balatono tre fama en Eŭropo. Julio Baghy fama hungara verkisto, poeto kaj instruisto instruis al li Esperanton en la jaroj 1950. Mi banis min en la varma lageto Heviz proksime de Balatono. La temperaturo en tiu lageto estis je 31 gradoj super nulo. La akvo tre taŭgas kontraŭ artrozo!

Mlada Boleslav Ĉeĥio

Post du tagoj ĉe Lago Balatono mi trajnveturis tra Hungario kaj Slovakio dum unu tago al Ĉeĥio. En Mlada Boleslav norde de Prago gastigis min geesperantistoj kaj Jindra, kiun mi konis de 20 jaroj.

Ĉeĥio tre ŝanĝiĝis post la disfalo de socialismo en 1989. Urboj pli beliĝis sed la senlaboreco kreskis. Antaŭe la medicino estis senpaga kaj preventa. Nun la popolo pagas parton de la kuracado kaj kuracilojn.

Mi prelegis pri mia vojaĝo kaj oni starigis al mi multajn demandojn pri rajtoj de virinoj en Irano.

Jindra klarigis al la neesperantistoj, kio estas Esperanto kaj kiamaniere mi vojaĝis dank'al Esperanto kaj Pasporta Servo.

Mi vizitis la klubon de Prago. Prago estas la ĉefurbo de Ĉeĥio, unu el la plej belaj ĉefurboj en Eŭropo.

Mi parolis al ili pri Irano kaj Margrit, kiu instruis al mi Esperanton en Ĉeĥio antaŭ kelkaj jaroj ĝojis ke la Esperanto-movado estas vigla en Irano.

Mi reveturis trajne dum unu tago al Francio tra Ĉeĥio kaj Germanio mia kapo plena da mirindaj memoraĵoj post du-monata rondvojaĝo!

Bruno HENRY

